

**Esperanto en
en tempoj de
Artefarita
Intelekto**



Quer aprender **ESPERANTO?**

PROGRAMO MIA AMIKO



easp
Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

pma.brazilo.org

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Ĉu ankoraŭ estas tempo?
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**
Humanisma trezoro
- 6 | **Iom da scienco**
Manoel de Abreu kaj la diagnozo de tuberkulozo
- 7 | **Kino kaj aliaj artoj**
Mi ankoraŭ estas tie ĉi
- 9 | **Iom da poezio**
Mi kredas / Percepto
- 10 | **Kovrilartikolo**
E-o en tempoj de Artefarita Intelektio
- 14 | **Rakonto**
"Oni diras"
- 16 | **Kuriozaĵo**
La plej juna litero de la latina alfabeto
- 18 | **Por iom mediti**
La antikveco malkonis la bluan
- 19 | **Edukado**
La malpermeso de poŝtelefonoj en brazilaj lernejoj
- 22 | **Diskonigo**
Publikigo de valora informilo
- 23 | **Iom da gramatiko**
Lingvaj Respondoj
- 25 | **Iom da filozofio**
Vizito al Paskalo en liaj lastaj tagoj
- 27 | **El mia vidpunkto**
La historio de juna viro en E-o
- 29 | **Movado**
BKE 2025 en la ĉefurbo Braziljo



66-a jaro n-ro 191 2025:1

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2025

Simple Membro R\$ 200,00
Subtena Membro R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro R\$ 100,00

Ĉu ankoraŭ estas tempo?

Paulo Sergio Viana

Jen la jaro 2025 rapide galopas, kaj lasas la okazaĵojn de 2024 kiel forajn rememoraĵojn. Ĉu la tempo fluas pli rapide, kara leganto?

La vivo ne atendas. Nia unua numero de La Lampiro en ĉi tiu hastema jaro estas sufiĉe varia, bunta, interesa. Pluraj verkemuloj kuraĝe kontribuas, kaj ni eĉ havas debutanton. Dankon al vi, Gustavo!

Apartan atenton mi petas de la leg-

antoj pri la grava teksto de Adonis Saliba: saĝa, sagaca, trafa, klera! Artefarita Intelekto, kiun multaj rigardas suspekteme, devas esti traktata precize kiel faris Saliba — prudente! Estus interese ricevi la opinion de vi, kara leganto, pri ĉi tiu tute aktuala temo.

Cetere, ĉu mi jam deziris al vi feliĉan novan jaron? Se ne, ĉu ankoraŭ estas tempo?

Verdan brakumon al ĉiuj!

Celanta interesatojn kiuj deziras akiri parolo-fluecon.

Ĉiun sabaton matene,
de la 9h ĝis 11h,
en la sidejo de EASP.



Humanisma trezoro

Esmeraldo de Alencar Lima

Kara samideano:

Unu nova jaro jam fluas, kaj ni en EASP forte deziras plibonigi nian agadon. Ĉiusabate nia sidejo estas malfermata por akcepti vizitantojn kaj kunlaborantojn. Ni bezonas homojn por aldoni viglon al nia sankta afero, kiun oni plenumas kun amo. Amo movas la homojn!

Ni volas viajn ideojn kaj proponojn. Nia unuiĝo postulas nian renkontiĝon,

nian interparoladon, kaj ĉeeste kaj virtuale. Nia sidejo devas reviviĝi! Zamenhof donis al ni trezoron por nia interfratiĝo kaj kunlaborado.

Esperanto ne estas nur lingvo, sed humanisma movado. Ni ja dankas por via apogo al niaj interretaj agadoj, sed ni bezonas ankaŭ brakumojn kaj manpremojn. Venu viziti nin, nian libroservon, nian bibliotekon.

Jen mia elkora invito al vi!

ESPERANTISTOJ EN LA PARAIBA-VALO

LORENA/SP

19-A APRILO 2025

De la 9-a ĝis la 17-a horo

LOKO: CLUBE COMERCIAL DE LORENA

Praça Geraldo Prudente de Aquino, 01 - Centro, Lorena - SP



**VENU PRAKTIKI ESPERANTON
EN AMIKA RONDO!**


Manoel de Abreu kaj la diagnozo de tuberkulozo

Aleksandro Prado

Ĉu vi iam submetiĝis al abreŭgrafia ekzameno? Se jes, vi danku sciencistojn kiel Manoel Dias de Abreu kiu helpis plibonigi la diagnozon de pulmaj malsanoj. Li naskiĝis en 1891 en San-Paŭlo kaj dediĉis sian vivon al la studo pri radiologio, precipe dum la epidemio kontraŭ tuberkulozo, publika sanproblemo de tiu tempo.

Post kiam li diplomiĝis pri medicino en Rio-de-Janeiro, li laboris en gravaj hospitaloj kaj profundigis siajn studojn pri radiologio. En 1922, li rimarkis, ke tuberkulozo disvastiĝis senrege. La problemo estis ke homoj serĉis kuracadon nur kiam la malsano jam estis en severa staĝo, tiamaniere ke la flegado estis ne tre efika. Tial li ellaboris metodon por faciligi diagnozon: la abreŭgrafion.

Scienco ne disvolviĝas izolite. Sciencistoj respondas al la bezonoj de la socio kaj laboras en kunlaboraj retoj. Tiam, Manoel de Abreu ne kreis tekni-



Supre: Tiutempa propagando pri la malsano.



Malsupre: Manoel Dias de Abreu (1891 - 1962)

kon sola. Li uzis la antaŭajn eltrovojn de radiologio kaj ricevis subtenon de medicinaj institucioj por testi kaj apliki sian ideon.

En 1934, li prezentis la eltrovon al la medicina komunumo. Abreŭgrafio ebligis pli rapidan ekzamenon de la

(Daŭrigota sur la paĝo 8)

Mi ankoraŭ estas tie ĉi

Anna Lobo de Carvalho

Originala titolo: Ainda estou aqui

Direktoro: Walter Salles

Aktoroj; Fernanda Torres, Selton Melo,

Fernanda Montenegro

Tipo de filmo: Biografia dramo

Landoj: Brazilo kaj Francio

Lanĉo: 01.07.2024

Tempodaŭro: 135 min



Je la etoso de Oscar-premioj, mi decidis verki pri la brazila filmo kiu estas preparolata de multaj lastatempe. Ĝia titolo estas “Mi ankoraŭ estas tie ĉi”. Mi spektis ĝin antaŭ nelonge en la kinejo de mia urbo, kaj ĝi ja eĉ trapasis la atendojn. Estas vera nuntempa juvelo.

La filmo estas inspirita je la libro kun la sama titolo de Marcelo Rubens Paiva. Ĝi rakontas pri liaj spertoj de kiam okazis la malapero de lia patro, Rubens Paiva, kiu estis kaptita kaj mortigita de tiama brazila diktaturo. Ankaŭ estas grave kiel lia patrino, Eunice Paiva, reagis al ĉio tio.

La aktorado de ĉiuj estis perfekta. La rigardoj, esprimoj. Nia granda aktorino Fernanda Torres estas vere brila. La komenco de la filmo montras la bonan kaj feliĉan familian etoson dum sufiĉe da tempo, ke la spektanto sentu sin ligita al la familio. Ankaŭ gravas la granda atento al la detaloj, kiel la uzado de “Coca Cola” por sunbruniĝi, la kutima flava skribilo kun ruĝa fina parto tiom kutima eĉ en la jaroj post la diktaturo, la recepto de sufleo kiu ankaŭ estis tre kutima, la vestaĵoj, la aŭtoj.

Estas sentebla la tuja ŝanĝo de etoso, de la momento kiam Rubens estis kaptita. Kaj kio sekvas post tio, estas vere skua. Fakte, mi vere sciis ke okazis, kiel okazis, sed spekti tion tiel vere alproksimigas nin de la okazaĵo. La filmo pensigas nin pri la beno ke tio jam iĝis pasinteco por nia lando, sed ke ni ne lasu tion reveni denove. Demokratio estas vere granda konkero por ni.

Estas du kuriozaĵoj pri la filmo kiujn mi volas rakonti al vi. La unua temas pri la reĝisoro Walter Salles, kiu estis proksima amiko de la familio, do li vere konis ĉiujn tie. La dua estas ke la aktoro Selton Melo, post registri ĉiujn scenojn kun li, ne plu rajtis esti en la

ejo de la filmado kaj tio permesis ke la aktoroj sentu vere la mankon de la rolo kaj pli efike esprimu tion.

La filmo konkuras je jenaj kategorioj por Oscar ĉi jare: Plej bona aktorino kun Fernanda Torres, la plej bona internacia filmo kaj la granda surprizo estas ke ĝi konkuras kiel la plej bona filmo ankaŭ – kio estas vere ne kutima por ne usonaj filmoj.

Mi esperas ke mi sufiĉe instigis vin spekti tiun ĉi admirindan filmon! Ni montru nian apogon al ĝi kaj esperu ke ĝi gajnos ankoraŭ multajn premiojn! Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!



Daŭrigo de la pago 6

Iom da Scienco

pulmoj, helpante diagnozi tuberkulozon antaŭ ol ĝi fariĝis tro severa. Post mallonga tempo, ĉi tiu ekzameno fariĝis deviga por lerneja aliĝo kaj laboro. Manoel de Abreu estis trifoje nomumita por la Nobel-premio pri Medicino kaj ricevis internacian rekonon. Li ankaŭ verkis poezion kaj publikigis librojn.

Hodiaŭ lia kontribuo estas memorata en la Nacia Tago de Abreŭgrafio

(en la 4-a tago de januaro). Lia historio montras ke scienco ne nur faras malkovrojn, sed ankaŭ evoluas kaj adaptiĝas por plibonigi la vivon de homoj.

Por koni pli, konsultu!

Abreu, Manoel Dias de. **Dicionário Histórico-Biográfico das Ciências da Saúde no Brasil** (1832-1970).

Disponibla je: <https://dichistoriasaude.coc.fiocruz.br/dicionario>

Mi kredas

Petro Palivoda (Ukrainujo)

La luno brilas sur la nokta ondo,
Kaj lumas hele steloj tra l'eter'...

Ekdormu kalme, maltrankvila mondo,
Ripozu de malĝojo, kara Ter'.

Detruas vin militoj kaj suferoj,
Turmentas vin malamo kaj dolor',
Sed vivas tamen en la kor' esperoj
Al via bona kaj feliĉa hor'.

Ni strebu al paco, infanoj de l' Tero,
Aspiru la celon kun arda pasi',
Per lingvo komuna kaj en harmoni'!
Mi kredas je amo, feliĉo kaj vero!
Homaro, mi kredas je vi!

Ni ofte flugas pense al ĉielo,
Nin ebriigas alto kaj liber',
Allogas nin kaj ravas Dia belo
En ĉiu flor', nubeto kaj roser'.

Sed pafojn sonĝas beb' en sia lito -
Kaj super ĝi kliniĝas la patrin',
Ŝi sian bebon gardas de milito,
Kaj estas nia devo helpi ŝin.

Ni strebu al paco, infanoj de l' Tero,
Aspiru la celon kun arda pasi',
Per lingvo komuna kaj en harmoni'!
Mi kredas je amo, feliĉo kaj vero!
Homaro, mi kredas je vi!

Percepto

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)

Minuskla grajno el lumo
en la polvo de l' tempo,
mi eniris en la sinon de l' Vivo
kun ununura bagaĝo:
la senfina libereco
konstrui mian destinon.

Kaj mi formangîs jarmilojn
per armiloj de nescio
kaj malsaĝeco.

Hodiaŭ tamen
mi kultivas revojn kaj versojn
en la sekreta oceano,
kiu loĝas en la ĝardeno
ene de mi.
Mia vojaĝo senfinas...

E-o en tempoj de Artefarita Intelektio

Adonis Saliba

En nia hodiaŭa mondo, kie teknologio rapide progresas kaj artefarita intelekto fariĝas parto de nia ĉiutaga vivo, la demando pri la rolo de Esperanto en ĉi tiu nova erao fariĝas ĉiam pli aktuala. Kio estas la loko de lingvo, kies ĉefa celo estas internacia interkompreniĝo kaj lingva egaleco, en mondo regata de algoritmoj kaj grandaj datumbazoj? Multaj povus pensi, ke post la apero de potenca AI, kiu kapablas traduki tekstojn inter malsamaj lingvoj kun miriga precizeco, la ideo de internacia helplingvo fariĝas malpli grava. Sed fakte, la realo montras tute alian bildon.

Esperanto naskiĝis kun klara antaŭvido: forigi lingvajn barojn kaj doni al ĉiuj egalan ŝancon komunikiĝi, sendepende de ilia kulturo. Ĉi tiu idealisma projekto celis ne nur faciligi interkompreniĝon, sed ankaŭ kontraŭstari la lingvan hegemonion de la pli potencaj nacioj. Tamen, nuntempe, kiam AI pli kaj pli progresas, ni vidas kontraŭdiran fenomenon: anstataŭ disvastigi lingvan egalecon, la teknologia pro-

greso ofte plifortigas la pozicion de la regantaj lingvoj, precipe la angla. Tradukiloj funkcias plej bone por la plej uzataj lingvoj, dum minoritataj lingvoj riskas esti ignorataj aŭ eĉ perdi sian uzadon en la interreta mondo.

Ĉi tie eniras Esperanto kiel ebla solvo. Male al etnaj lingvoj, Esperanto ne apartenas al iu ajn lando aŭ kulturo. Ĝi estas neŭtrala komunikilo, kiu ebligas veran egalecon en internacia dialogo. Ĝi ankaŭ estas sufiĉe simpla por ke ĉiuj lernu ĝin rapide, kio donas al ĝi gravan avantaĝon en mondo kie la rapideco de komunikado estas ŝlosila faktoro. La demando do estas ne ĉu Esperanto estas anstataŭigebla per teknologio, sed ĉu ĝi povas iĝi natura komplemento por tiuj samaj teknologiaj evoluoj.

Artefarita intelekto, se uzata saĝe, povas fariĝi potenca ilo por disvastigi Esperanton. Ekzemple, AI povas esti uzata por krei pli efikajn lernilojn, kiuj instruas la lingvon per interagaj metodoj. Modernaj voĉrekonaj sistemoj

povas helpi la lernantojn korekti prononcon en reala tempo, dum interaktivaj dialogoj povas simuli realajn komunikadsituaciojn. La lernado fariĝas ne nur pli efika, sed ankaŭ pli amuza kaj alloga, precipe por junaj generacioj.

Aldone, AI povas esti uzata por aŭtomata interpretado en virtualaj kunvenoj, tiel ebligante homojn el diversaj landoj komuniki rekte en Esperanto. Ĉi tio povas kontribui al la disvastiĝo de la lingvo en la internaciaj komunumoj, ĉar ĝi forigas la bezonon uzi grandajn lingvojn kiel pontojn por interkomunikado. Kiam ĉiuj povas partopreni en diskutoj surbaze de neŭtrala lingvo, la interkompreniĝo fariĝas pli justa kaj inkluziva.

Tamen, la uzado de AI en la lingva sfero ne estas sen riskoj. Se teknologio estas uzata sen kritika pensado, ĝi povas pliampleksigi ekzistantajn maldogalecojn. La algoritmoj ofte estas desegnitaj por servi al la plej fortaj merkataj interesoj, kio signifas, ke ili tendencas favori la plej uzatajn lingvojn kaj kulturajn perspektivojn. En tia kunteksto, Esperanto povas ludi gravan rolon kiel modelo por pli etika kaj justa komunikado. Ĝi memorigas nin, ke la vera celo de teknologio devus esti servi la tutan homaron, ne nur la interesojn de la plej potencaj.



Imagu mondon, en kiu interretaj platformoj ofertas eblon uzi Esperanton kiel komunan lingvon por internaciaj diskutoj. En tia scenaro, oni povus partopreni forumojn, eventojn kaj kunvenojn sen ke oni estu devigata uzi la anglan aŭ alian regantan lingvon. Ĉi tio ne nur pliiĝus la diversecon de voĉoj aŭdeblaj en la cifereca mondo, sed ankaŭ protektus minoritatajn lingvojn kontraŭ malapero. Esperanto povus funkcii kiel ponto inter la malsamaj kulturoj, konservante la diversecon kaj samtempe ebligante egalecan komunikadon.

La estonteco de internacia komunikado estas pli internacia ol iam antaŭe. Projektoj kiel "Programo Mia Amiko" jam montras, ke eblas krei verajn interkulturan interkomprenon per Esperanto, eĉ en virtualaj medioj. Teknologio povas plifortigi ĉi tiun

tendencon, kreante novajn eblecojn por kunlaboro kaj interŝanĝo de ideoj sur tutmonda nivelo. La virtuala real-eco, ekzemple, povus permesi, ke homoj renkontiĝu en ciferecaj spacoj, kie ili uzas Esperanton por interkomuniki en maniero pli rekta kaj natura ol iam ajn antaŭe.

La grava demando do ne estas ĉu AI povos anstataŭi Esperanton, sed kiel ni povas uzi AI por plifortigi ĝiajn ideojn. Se ni sukcesos kunigi la fortojn de teknologio kun la humanismaj valoroj de Esperanto, ni povos krei novan

specon de tutmonda komunikado, kiu vere respektas la diversecon kaj egalecon de ĉiuj partoprenantoj.

Resume, Esperanto eble ne estos simple alternativa lingvo en la estonteco, sed fariĝos natura elekto por tiuj, kiuj serĉas pli justan kaj egalecan manieron komunikiĝi en mondo, kie la voĉoj de ĉiuj, sendepende de ilia deveno aŭ potenco, havas saman valoron. Tiel, en la epoko de artefarita intelekto, Esperanto povus montri al ni, ke la vera progreso ne estas nur teknologia, sed ankaŭ homa.



"Oni diras"

Juan Trepiana (Argentino)

(Ĉi tiu rakonto devas esti legata kiel infanrakonto, kiun neniu aŭskultos...)

Li amis paroli, fakte, superŝutita de sia propra lingvo, li obsesie ekstudis aliajn. Oni diras, ke li atingis paroli pli ol dekon, sed tio ne estas provebla. Li volis paroli, esti aŭskultata de homamasoj aŭ simple de iu amiko, de iu amo. Neniam estis klare, ĉu li sufiĉe aŭskultis aliajn.

Ĉu li havis tempon por tiu?

Oni diras, ke eĉ la hundoj de la nokta Buenos Aires lin rigardis suspekteme, kiam li provis paroli al ili, kaj ke iam li devis eviti nedeziratan mordeton. Fakte, stranga cikatro ornamis lian antaŭbrakon kiel speco de tatuoj, kiel memoro pri la dentoj de hundo. La katoj, kiuj laŭdire kapablas ŝajnigi, ke ili aŭskultas homan parolon, estis liaj plej ŝatataj; neniu sciis, ĉu ili vere aŭskultis lin. Estas tre malfacile scii, ĉu kato aŭskultas aŭ nur ŝajnigas.

Oni diras, ke li estis instruisto en kampara lernejo, sed neniu sciis, ĉu la

infanoj kondukis kiel la katoj, ŝajnigante aŭskulti lin dum ili revis pri siaj ĉevaloj, pri siaj belaj sunsubiroj, pri la fluetoj postlasitaj de la pluvo, speguloj por la luno en jam klariĝinta ĉielo.

Oni diras, ke tiuj infanoj revis siajn unuajn amajn suferojn, siajn vivojn troplenajn je eblaj estontecoj, anstataŭ aŭskulti lin. Kaj estas kompreneble: je certa aĝo oni povas nur aŭskulti siajn unuajn amajn suferojn.

Oni diras, ke li nek edziĝis nek havis iun amrilatan devontigon. La kialoj ŝajnas evidentaj: eble liaj amaj deklaroj ne estis aŭskultitaj.

Oni diras, ke la soleco kondukis lin al fama psikanalizisto, laŭdire el la franca skolo. Tio estis ĉar li legis la frazon de Lacan: "Ami estas doni tion, kion oni ne havas, al tiu kiu ne estas tio", kaj ĝi helpis lin elekti la vojon al psikanalizdivano. Li ne komprenis la frazon sed li ekamis Lacan. Li ne pliboniĝis... Eble tiam li jam ekkomprenis, ke neniu lin aŭskultis... Fine li iris konsulti aliajn

psikanalizistojn, sed supozeble, li ankaŭ ne estis aŭskultita. Li nepre ne pli-boniĝis. Ŝajnus, ke ne...

Oni diras, ke neniu konis lian nomon, ke neniu iam aŭskultis ĝin, kvankam oni supozas, ke li sin prezentis antaŭ ol paroli. Sed lia patrino... Lia patro... Neniu sciis ion ajn pri ili, neniam oni aŭdis pri lia deveno al la mondo.

Oni diras, ke jam tre maljuna, eĉ la morto ne volis aŭskulti lin, kaj ke li vagadis kiel ombro tra la noktoj de Buenos Aires dum pli ol cent jaroj.

Oni diras, ke tiu ombro ne falis sur la teron, sed sur la aeron. Li estis eĥo sen korpo, voĉo sen tempo.

Oni diras, ke, finfine, iun nokton la morto flustris al lia orelo: "Kara, ni iru."

Li volis respondi, diri ion, sed jam estis tro malfrue. Kelkfoje la morto estas tre senpacienca. Ŝi rigardis lin en la okulojn kaj metis kiseton sur liajn lipojn antaŭ ol forporti lin.

Oni diras, ke en nokta kaj fantoma Buenos Aires ankoraŭ vagadas la eĥo de lia voĉo. Ĉiuj liaj vortoj en ĉiuj lingvoj iam prononcitaj aŭdiĝas de tempo al tempo, parolante al enamiĝintaj junuloj, al vagabondoj endormiĝantaj sur trotuaroj, al solaj drinkuloj, al hundoj, al katoj...

Mi ankaŭ lin aŭdis, kiam en stacidomo la nebulo iĝas mistera kaj sendorma. Kiam disiĝas la lasta sono de la lasta trajno.

“Oni diras.”



La plej juna litero de la latina alfabeto

James Rezende Piton (Paulínia-SP)

Iuj povos opinii, ke mi elektis priskribi tiun literon pro tio, ke ĝi estas la komenclitero de mia nomo – ĉu tio estas speco de alfabeto "nepotismo"? – sed mi ĝin elektis pro kurioza historio

La plej grandan parton de la latina alfabeto ni uzas, ne surprize, de kiam la latina estis ĉiutagaĵo tra la Romia Imperio. En siaspece bela stilo de gravuraĵoj ĉizitaj sur pecoj da granito, marmoro kaj aliaj ŝtonoj kaj metaloj, ni rekonas "nian" alfabeton, tiun ankaŭ de portugallingvanoj kaj de esperantistoj. Oni trovas ekzemple:

IMP•C•IVLIVS•CÆSAR•DIVVS

La litero V havis la sonon "u", do temas pri la jena homo:

IMP – Imperator ("pova komandanto", de kie venas nia "imperiestro")
C – Gajus (la distingo C kaj G estis konfuza), lia unua, persona nomo,


IVLIVS – Iulius, t.e. de vasta kaj tradicia familia grupo Julia CÆSAR – Caesar, familia nomo. Povas esti, ke ĝi venas el la vorto *caesaries*, kio indikus, ke lia praulo havis longan aŭ abundan hararon. Posteuoloj adoptis la nomon kiel titolon por la Romia reganto (de kio poste venis la germana "Kaiser" kaj la rusa "caro", i.a.) DIVVS – Dius, t.e. diigita per dekreto de la Romia senato en la jaro 42 a.K., post lia morto en 44 a.K. Niaj latinidaj poste distingis tiujn du "V" – pensu nur pri la portugalaĵ "diva", "divino" k.m.a.)

Do Julio Cezaro havis en sia latina nomo la literon "I". Kial ĝi fariĝis "J"?

En la klasika latina, supozeble (ĉar neniu tiama parolanto lasis gramofondiskon...) la litero I havis du sonojn, kaj respondis al la esperantaj sonoj i kaj j. ITER legiĝis kiel ni legas en Esperanto kaj IVS legiĝis kiel "jus".

Dum la Mezepoko oni komencis distingi la literon I kiam ĝi estis komenclitero aŭ havis pli fortan sonon. Kiam ĝi havis duonvokalan sonon, oni skribis ion similan al la litero J. En la 16-a jarcento la distingo fariĝis kutima, danke al la itala gramatikisto Gian Giorgio Trissino.


En la apuda dokumento el 1669 de la iama Respubliko Venecio, oni vidas presitan tekston en la itala, kaj en ĝi ekzemple la vorton "Sauij", saĝuloj. La litero u denove en konfuzo kun v, do "savio" estis la singularo. Pluralo de maskla vorto en la itala fariĝas per "i", do "savii", kaj jen la dua I, malpli forta, skribita kiel "j". Pluralo kun "j" ŝajnas familiara, ĉu ne?



La uzo, kiun oni poste donis al tiu litero tamen tre malsamas. En la franca, ĝi reprezentas nian sonon ĵ, en la angla la sonon de nia ĝ kaj en la hispana, ĝi reprezentas la sonon de nia ĥ! En la germana ĝi havas la sonon kiel en Esperanto.

Kurioze, en la itala mem la litero J (kiun ili nomas "longa I") malaperis en la 20-a jarcento. *Gennajo* (Januaro), ekzemple, nun skribiĝas "*gennaio*". Oni konservas la J por fremdaj vortoj kiel en la nomo de la ĉefa futbalteamo de Italio, Juventus, "la Juve". Kun blazono en formo de granda J, la teamo estis fondita en Torino en 1897 laŭ la respektinda latina vorto por "juneco".

Bildo: Formulario por peticioj al la registaro de la Respubliko Venecio, kies simbolo estis la flugilhava "Leono de Sankta Marko". La formularo estis vendata kaj en la prezo troviĝis: 1) la servo liveri la peticion al la koncerna registara instanco kaj 2) imposto kiel kontribuo al la konservado de la kanaloj de Venecio. Tial la dokumento havis tiun kaptitolon "A Qe", kiu sonis kiel la itala vorto por "akvo". (Kolekto de la aŭtoro)



La antikveco malkonis la bluan

Cesar Dorneles


Brita William Ewart Gladstone (1809-1898), intelektulo, kaj diversfoje Ĉefministro, admiranto de la verkoj de Homero, estis tiu, kiu unuafoje rimarkis, ke la greka poeto, malgraŭ siaj multnombraj priskriboj, neniamomente faris aludon al la tonoj de la koloro blua, ĉeestantaj en la Naturo. En siaj esploroj rilataj al la mencio de koloroj, ĉu en Iliado, ĉu en Odiseado, li konstatis, ke dum la blanka estis menciita centfoje kaj la nigra preskaŭ ducent, la ruĝa, la verda kaj la flava estis malofte menciitaj. Nenia aludo al la blua, inkluzive en aliaj verkoj de la epoko.

Germana lingvistiko Lazarus Geiger konstatis, ke la fenomeno samokazis en aliaj kulturoj, tiaj kiaj en la araba (Korano), ĉina, hebrea (en la unuaj partoj de la Biblio), islanda kaj hinda (Vedoj).

Jules Davidoff, psikologo (Londono), levis demandon pri la kuriozeco pri la blua koloro por la ĉielo kaj la maro, konsiderante, ke la kolorecoj estas ŝanĝemaj en ambaŭ kazoj. En eksperimento ĉe tribo de

Namibio, li observis, ke homoj havis nenian vorton por nomi la bluan koloron. Kompense ili uzis diversajn terminojn por nomi malsimilajn verdtonojn.

Deutscher, alia esploristo scivolema pri la demando, faris eksperimenton kun la propra filino kiam ŝi estis infaneto: Li instruis al ŝi la nomojn de la koloroj de objektoj, inkluzive la bluan. "Kiam mi certis, ke ŝi scias uzi la vorton blua por la objektoj, mi eliris kun ŝi en tagoj de blua ĉielo kaj demandis, kia estas ĝia koloro." Ŝi ne sciis respondi. Li komprenis, ke ne estis urĝa neceso por ŝi atribui koloron al la ĉielo. Ĝi ne estas objekto... La antikvaj popoloj pensis sammaniere.



La malpermeso de poŝtelefonoj en brazilaj lernejoj

En la lastaj jaroj, la ĉeesto de poŝtelefonoj en brazilaj lernejoj generis intensan debaton inter edukistoj, gepatroj kaj lernantoj. Kreskanta zorgo pri la negativaj efikoj de ĉi tiu teknologio je la lernado igis multajn instituciojn malpermesi aparatojn dum lernejaj horoj. Tamen, dum multaj konsideras, ke la malpermeso povas plibonigi fokuson kaj koncentriĝon, aliaj pridubas la malfavorajn efikojn de ĉi tiu decido, kiel la perdo de movaj funkcioj de studentoj. Ĉi tiu artikolo serĉas esplori la efikojn de ĉi tiu decido kaj analizi la konsekvencojn de ĉi tiu malpermeso por la ampleksa edukado de gelernantoj kaj listigi la kontribuojn de ĉefaj aŭtoroj pri la temo.

Leĝo n-ro 15.100, de la 13-a de januaro 2025, reguligas la uzon de personaj portebblaj elektronikaj aparatoj, kiel poŝtelefonoj, fare de studentoj en publikaj kaj privataj bazedukaj institucioj en Brazilo. Ni povas listigi poziti-

tivajn kaj negativajn aspektojn pri ĝia efektivigo. ekzemple, pozitive efiki, plibonigante koncentriĝon kaj akademian rendimento, plibonigante soci-anigton, mensan kaj fizikan sanon. Aliflanke, negativaj aspektoj, kiel: ebla cifereca ekskludo kaj la efiko al studentoj kun specialaj bezonoj. La leĝo prezentas pozitivajn intencojn serĉante krei pli fokusitan kaj sanan lernejan medion. Tamen, estas grave konsideri kaj trakti la defiojn ligitajn kun ĝia efektivigo por ekvilibrigi la celitajn avantaĝojn kun la bezonoj kaj realaĵoj de la nuna eduka kunteksto.

La kreskanta enmeto de teknologioj en la ĉiutagan vivon rekte influis la lernejan medion. La uzo de poŝtelefonoj, ekzemple, estis ofta praktiko inter junuloj, kaj por komunikado kaj por aliri la interreton. Tamen, la troa kaj senrega uzo de ĉi tiuj aparatoj en lernejoj vekis zorgojn pri studenta distro, malrespekto al reguloj kaj malfacileco koncentriĝi dum klasoj.

Brazila psikopedagogo kaj edukisto César Nunes atentigas, ke la konstanta ĉeesto de poŝtelefonoj en lernejoj kontribuas al kogna troŝarĝo ĉe studentoj, malfaciligante la lernadon. Li emfazas, ke, anstataŭ antaŭenigi lernadon, poŝtelefonoj fine fragmentigas la atenton de studentoj, kiuj ofte alternas inter klasoj kaj la uzo de aplik-aĵoj kaj sociaj retoj. Por Nunes, malpermesi poŝtelefonojn, almenaŭ dum lernejoj horoj, estus necesa decido por konservi la fokuson de studentoj kaj la kvaliton de instruado.

La ĉefa pravigo por malpermeso de poŝtelefonoj en brazilaj lernejoj estas la bezono kontraŭbatali distriĝon dum klasoj. Tamen, ĉi tiu decido ankaŭ rezultigas kromefikon, kiu, kvankam ofte neglektita, povas esti signifa: malkreskon de legado. La uzo de poŝtelefonoj povas, fakte, instigi legadon, precipe se ni konsideras novajn ciferecajn formatojn, kiel ekzemple e-librojn kaj edukajn aplik-aĵojn. Instruistino kaj eduka specialisto Maria José Gouveia emfazas, ke poŝtelefonoj, bone uzataj, ofertas aliron al amaso da literaturaj kaj informaj enhavoj, stimulante la scivolemon kaj intereson de la gejunuloj pri legado. Tamen, la malpermeso de aparatoj povas malfaciligi ĉi tiun aliron, ĉar multaj lernantoj, precipe pli junaj, ne

emas uzi presitajn librojn tiel ofte kiel ili uzas siajn porteblajn aparatojn.

Krome, la troa uzo de poŝtelefonoj en lernejoj ankaŭ rilatas al signifa efiko al la disvolviĝo de korpmovaj funkcioj. Neŭropsikologo João Carlos Martins atentigas, ke la konstanta uzo de porteblaj aparatoj povas malhelpi la movan kunordigon de lernantoj, precipe en pli junaj aĝgrupoj, kiam tiu funkcio ankoraŭ disvolviĝas. Konstanta interago kun ekranoj, ofte sen granda fizika movado, povas damaĝi la disvolviĝon de fajnaj movaj kapabloj, kiuj estas esencaj por agadoj kiel skribado, desegnado kaj manipulado de objektoj. Martins sugestas ankaŭ, ke la troa ciferecigo de edukado povas konduki al malplivalorigo de manaj kaj fizikaj agadoj, kiuj estas fundamentaj por la kompleta disvolviĝo de infanoj kaj adoleskantoj.

Psikologo Patrícia Gomes kontribuas al tiu pripensado deklarante ke mova kunordigo ne nur disvolviĝas per tradiciaj fizikaj interagoj, sed ankaŭ per agadoj kiuj implicas kritikan pensadon kaj problemon. Tamen, kiam studentoj kutimiĝas fidi je teknologio por preskaŭ ĉiuj siaj taskoj, ili ĉesas praktiki movajn kapablojn nature, kio povas konduki al malfriiĝo fizika kaj kogna misevoluo. Gomes sugestas ke, anstataŭ strikta malpermeso de poŝ-

telefonoj, estus pli efike eduki lernantojn uzi ilin en ekvilibra maniero kiu estas integrita en la eduka procezo.

Finaj konsideroj

La malpermeso de poŝtelefonoj en brazilaj lernejoj estas decido, kiu celas kontraŭbatali distriĝon kaj antaŭenigi disciplinon. Tamen, ĉi tiu aliro ne devus esti vidata kiel unusola kaj definitiva solvo al problemoj ligitaj al troa uzo de teknologio. Anstataŭe, necesas konsideri la kromefikojn de ĉi tiu malpermeso, precipe koncerne malaltajn legajn indicojn kaj la perdon de movaj kapabloj de lernantoj.

Eblas argumenti, ke poŝtelefonoj, se uzataj strategie, povas esti valora ilo por stimuli legadon kaj plibonigi la kognajn kaj movajn kapablojn de lernantoj. Tamen, la manko de ekvilibra aliro povas havi negativajn efikojn al la intelekta kaj fizika evoluo de lernantoj. Tial, anstataŭ adopti kompletan malpermeson, estus pli produktive antaŭenigi ciferecan edukadon, povigante studentojn uzi teknologiojn en produktiva kaj sana maniero. Lernejoj devas serĉi solvojn, kiuj integras la uzon de poŝtelefonoj konscie, sen damaĝi la akademian kaj movan disvolviĝon de studentoj.

Bibliografiaj Referencoj

LEÇO N-ro 15.100, DE LA 13-A DE JANUARO
2025

ALMEIDA, Ana Carolina. La respondeca uzo de teknologio en lernejoj: studo pri cifereca edukado kaj memregado. San-Paŭlo: Editora Educacional, 2022.

GOMES, Patricia. Teknologio kaj mova evoluo en infanaĝo: Pripensoj pri la efiko de ekranoj sur la fizika kaj kognna kresko de studentoj. San-Paŭlo: Editora Educação e Saúde, 2023.

GOUVEIA, Maria José. Teknologio en edukado: Defioj kaj ŝancoj en la uzo de poŝtelefonoj en lernejoj. Rio-de-Janeiro: Editora Educacional, 2021.

MARTINS, João Carlos. Motora kunordigo kaj teknologio: La efikoj de troa uzo de porteblaj aparatoj sur la disvolviĝo de infanoj. Porto Alegre: Editora Psi, 2022.

NUNES, Cezaro. Teknologio kaj lernado: La efiko de poŝtelefonoj en la lerneja medio. Rio-de-Janeiro: Editora Pedagógica, 2021.

SILVA, Marko. Poŝtelefonoj kaj edukado: Defioj kaj eblecoj en la uzo de teknologioj en lernejoj. Porto Alegre: Akademia Redaktoro, 2020.

Patricia Guerra Radsack

PhD-studento ĉe Salgado de Oliveira University – Niterói-RJ Campus. Havas magistron de Universidade Salgado de Oliveira – Campus Niterói-RJ.



Estas diplomita pri Historio ĉe la Universitato Salgado de Oliveira en São Gonçalo – RJ. Ŝi havas kvalifikojn en Geografio, Sociologio kaj Filozofio. Disvolvas esploradon en la areo de krimo en la regiono Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento.

Eldonejo Lorenz publikigas valoran informilon

En ĉi tiu jaro 2025, Eldonejo F.V. Lorenz festas en Brazilo sian 50-jariĝon. Temas pri konstanta, serioza kaj kompetenta agado por diskonigo de Esperanto kaj Spiritismo, en la tuta mondo. Kvankam ĝi ne estas neŭtrala institucio, tamen ĝi klopodas konservi tolereman, larĝmengan sintenon kaj vidpunktojn, kiuj neniam ĝenas alikredulojn.

Pro tio, ĝi ĉiam ricevas apogon de la publiko.

Antaŭ kelkaj semajnoj, la Eldonejo publikigis en la portugala lingvo plian valoran materialon, kiu meritas atenton de la brazila Esperantistaro. Ĝi estas la broŝuro “*Esperanto – Língua internacional neutra auxiliar*”, tute taŭga por objektiva informado. La 32-paĝa libreto, riĉe kaj kolore ilustrita, enhavas ampleksajn tekstojn pri Esperanto, ĝia kulturo, ĝia movado kaj eĉ kelkaj elementoj de la lingvo mem.

Ĉi tiu valorega materialo, kiun E.F.V.Lorenz disponigas al la brazila publiko alvenas por oportune plenigi mankon en nia diskoniga laboro por Esperanto en Brazilo. Ĝi meritas ĉies apogon.

Mendu per editora_lorenz@uol.com.br

Gratulon al la geamikoj de Lorenz!



Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Demando

Brazilanoj ofte dubas pri la uzo de la verbo post *ke*. Ekzemple, kiun verbofinaĵon uzi en la jenaj frazoj?

Petro estis severe malsana. Neniu supozis, ke li ankoraŭ resaniĝos/resaniĝus.
Mi antaŭvidis, ke Jozefo neniam revenos/revenus post tiu danĝera ekskurso.
Post tiu kverelo, mi sentis, ke mia amiko neniam pardonos/pardonus min.

Respondo

La kerno de ĉi tiuj duboj kuŝas en la roldiferencoj inter la Esperantaj os-modo kaj us-modo. La us-modo esprimas ion nerealan, okazantan aŭ okazontan nur image, dum la os-modo esprimas ion reale okazontan. Alivorte, la os-modo efektive esprimas *tempon*, dum la us-modo esprimas ne *tempon*, sed *imagon* aŭ *kondiĉon*. Brazilanoj ofte konfuziĝas pro la t.n. *preterita futuro* de la Portugala lingvo, kiu esprimas du malsamajn situaciojn, konsistantajn en: 1) agoj aŭ statoj imagaj aŭ dependantaj de iu kondiĉo; 2) pasinteco, kiam oni esprimas ion, ĉu imagan aŭ realan, kiu okazos estontece. Do la *preterita futuro* de la Portugala estas *unu verbo-modo* koncernan-

ta *du malsamajn situaciojn*; ĉiu el tiuj du situacioj estas esprimata en Esperanto per *unu malsama verbomodo*.

Laŭ la ĉi-supre prezentitaj principoj, eblas konkludi, ke en la unua kaj tria frazoj taŭgas kaj la us-finaĵo kaj la os-finaĵo. Tamen memoru, ke la signifoj ne estas absolute egalaj en ĉiu paro; per la us-finaĵo oni emfazas imagon, dum per la os-finaĵo oni emfazas realon. Koncerne la duan frazon, la os-finaĵo ŝajnas al mi multe pli taŭga ol la us-finaĵo, ĉar efektive temas pri reala okazontaĵo, ne pri imago.

Por plia klarigo de tiu konfuzo, mi esceptokaze citos portugallingvajn tekstojn kaj prezentos taŭgajn esper-

antigojn. Por komenci, jen du ekzemploj ĉerpitaj el Machado de Assis, en kiuj la us-finaĵo pli taŭgas:

Poeta que **fosse**, não **poderia**, usando a linguagem humana, transmitir-lhe a emoção da grandeza. (A segunda vida) En Esperanto: *Eĉ **se mi estus** poeto, mi ne **povus**, uzante homan lingvon, transdoni al vi la emocion de grandiozo.* Klare temas pri imaga situacio, do oni uzu la os-modon.

Cândido **quisera** efetivamente fazer outra coisa [...]; **seria** um modo de mudar de pele ou de pessoa. (Pai contra mãe) En Esperanto: *Cândido efektive **deziris** alian laboron [...]; ĝi **estus** maniero ŝanĝi sian haŭton aŭ personecon.* Temas pri deziro, ne pri reala situacio, do la us-finaĵo taŭgas.

Jen nun kvar ekzemploj, en kiuj la os-finaĵo pli taŭgas:

[...] **prometeu** que o **recomendaria** a alguns amigos [...] (A chinela turca) Tiun frazparton eblas traduki per: [...] *li **promesis**, ke li **rekomendos** lin al amikoj [...].* Notu, ke tie ĉi la preteritan futuron oni devas esperantigi per simpla os-modo; la formo *li promesis*, ke li rekomendus estas malbona, ĉar temas ne pri imagaĵo, sed pri okazontaĵo.

[...] **pediu** à mulher que **desse** ao filho o resto do leite que ele **beberia** da mãe. (Pai contra mãe) En Esperanto: [...] *li **petis** sian edzinon **doni** al la knabo la reston de la lakto, kiun li **suĉos** el sia patrino.* Temas pri realaĵo, ĉar la knabon li baldaŭ forportos, do oni uzu la os-modon.


Então **declarei**-lhe que me **mataria**; [...]. (A segunda vida) En Esperanto: *Tiam mi **deklaris** al ŝi, ke mi **mortigos** min; [...]* Klare temas pri okazontaĵo, ne pri imagaĵo.

Fez-me jurar que **cumpriria** tudo, que a **observaria** bem, [...]. (Eterno!) En Esperanto: *li **ĵurigis** min, ke mi ĉion **plenumos**, ke mi **observos** ŝin detale, [...]* Klare temas pri promeso reale plenumi la peton estontece.

Tamen, kiel jam vidite, eblas en kelkaj frazoj traduki la preteritan futuron kaj per la us-modo kaj per la os-modo, depende de la interpreto:

[...] que lhe **diria**, se ele **tocasse** ao ponto e **indagasse** da pessoa? (Eterno!) Mia esperantigo de tiu frazparto estas la jena: [...] *kion mi **dirus**, se li **tuŝus** la aferon kaj **demandus** min pri*

(Daŭrigota sur la paĝo 26)



Imaga interparolo kun filozofoj

Vizitante Paskalon en liaj lastaj tagoj (jaro 1662)

— Sinjoro Paskalo, pardonu, ke mi vizitas vin nun, kiam vi estas tiel malsana.

— Ne gravas, vizitanto. Fakte estus malfacile renkonti min tute sana.

— Kompreneble. Vi estis preskaŭ bebo, nur unujara, kaj havis gravan nekonatan malsanon. Via stomako ŝveliĝis kaj oni kulpigis pri tio virinon, kiu vartis vin. Oni diris, ke ŝi estas sorĉistino...

— Kompatinda maljunulino! Certe ŝi ne kulpis. La amaso da sanproblemoj, kiujn mi havas nun, estante nur 39-jara, pruvas tion. Ŝajnas, ke mia kapo eksplodos.

En tiu momento, la vizitanto memoris, ke baldaŭ nekropsio montros, ke li suferis tuberkulozon, stomakan kaj cerban kanceron. “Povra Paskalo! Tiel inteligenta kaj tiel malsana!”

— Kvankam vi ankoraŭ estas juna, vi okupiĝis genie pri tiom da aferoj, ke estas malfacile al mi elekti kion demandi. Ĉu fakte Kartezio ne kredis, ke vi estas la aŭtoro de matematika eseoj pri konikoj?

— Fakte, li pensis, ke mia patro faris la eseon, nur pro tio, ke mi estis 16-jara. Ĉu vi ne opinias, ke lia sinteno estis stranga, kara vizitanto? Eĉ infanoj kapablas teoriumi pri matematiko aŭ aliaj sciencoj, se ili komencas studi frue.

— Permesu al mi ŝerci, Sinjoro Paskalo. En kiu mondo vi vivas? Nur geniuloj faras tion. Bone, krom matematikisto, vi estas ankaŭ inventisto, ĉu ne? Sciu, ke kelkaj el viaj kalkuliloj estas admirataj en eŭropaj muzeoj.

— Ha, mi inventis ilin por helpi mian patron. Li estis fiskinspektoro kaj bezonis fari multajn kalkulojn. Tamen

mi preferas diri, ke mi estas inventinto, ne inventisto, ĉar mi ne plu inventas kaj ne inventis por gajni monon.

— Kompreneble, kaj vi multon faris pro nura amo al sciencoj, elpensante famajn teoremojn, eksperimentojn kaj principojn en malsamaj branĉoj, kiel geometrio, statistiko, hidrostato... Ĉu oni povas diri, ke vi fariĝis filozofo pro amo al la homaro?

— Jes, mi amas la homaron. Tamen, mi konfesas, ke mi ekinteresiĝis pri filozofio pelita de profunda spirita krizo. En la aĝo de tridek unu jaroj, mi havis intensan mistikan sperton, kiu igis min pensadi pri la plej gravaj demandoj de la homa ekzistado, pri la mizero kaj grandeco de la homo, pri la signifo de la vivo.

— Via libro “Pensoj” fariĝis deviga legaĵo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri filozofio, ĝi estas monumenta verko. Ĉu ekzistas aparta penso aŭ kompren-

aĵo, kiun vi konsideras la plej grava en via laboro?

— Se mi devus elekti, mi reliefigus la “veton pri la ekzisto de Dio”. La centra ideo estas, ke kiam oni pri-konsideras la ekziston de Dio, la homo havas du eblojn: kredi aŭ ne kredi. Mi montras, ke estas pli racie veti, ke Dio ekzistas. [Tusante] Mi ŝatus koni vian opinion pri tio, sed mi estas laca.

— Pardonu, ke mi okupis multe de via tempo, vi bezonas ripozon. Certe mia opinio pri tia grava demando estus sensignifa. Mi tuj foriros, por ke vi restu trankvila. Mi petas nur, ke vi elektu du el viaj filozofiaj diraĵoj por miaj legontoj.

— [Plu tusante] Plezure! Diru al ili, ke “la koro havas kialojn, kiujn la racio mem ne konas”, kaj ke “homo ĉiam pretas nei ĉion, kion li ne komprenas”.

José Mauro Progiante



Daŭrigo de la pago 24

lom da Gramatiko

certa persono? La interpreto estas, ke la ĉefrolulo prezentas al sia menso situacion, do la us-modo estas tute ĝusta; tamen ankaŭ eblas interpreti,

ke la situacio reale okazos, do ankaŭ eblas la traduko: [...] *kion mi **diros**, se li **tuŝos** la aferon kaj **demandos** min pri certa persono?*

La historio de juna viro en Esperanto

Mi malkovris Esperanton pere de amiko kiu loĝas en la Sudo de Brazilo. Antaŭ ĉirkaŭ ses monatoj, antaŭ la pandemio de Kovimo, li afiŝis foton sur Instagram, kiu kaptis mian atenton: la foton de la libro “Esperanto para principiantes”, de Aloisio Sartorato.

Aŭtomate tio vekis mian intereson. De tiam mi multe esploris pri la lingvo, spektis filmetojn kaj konektis al io, pri kio mi ĉiam pasiis: kulturo kaj aprezo de idealo.

En 2020, la pandemio trafis kaj mi povis mergi min en miajn studojn. Mi aĉetis la libron Esperanto por komencantoj, mi aĉetis vortarojn kaj spektante videojn mi povis komenci mian vojaĝon ene de la lingvo. Io, kio estis sorĉa, alportis al mi konsolon kaj donis al mi pacon en mia koro. Per miaj studoj mi povis instrui al mia patrino kaj miaj filinoj plurajn vortojn en Esperanto.

Per miaj studoj mi povis konstati, ke Esperanto ne estas nur lingvo, sed

idealo de vivo, kiu helpas la homaron, super ĉiuj religiaj kaj politikaj valoroj.

Pro mia fascino pri la lingvo, mi decidis aĉeti ĉemizon, kiun mi trovis en la interreto kun la Esperanto-flago. Ĉi tio estis momento kiu vere lasis markon sur min, ĉar unu tagon viro haltigis min kaj diris: "Mia avino parolis flue Esperanton." Ĉar mi vidis, kiel senteme la viro diris tion, montriĝis al mi klare la efiko kiun tiu lingvo havas.

Mi vekis la intereson de pluraj amikoj por lerni kaj interesiĝi pri la lingvo, kaj mi rimarkis, ke multaj legas per la tradukilo aŭ spektas videon. Mi memstare komencis krei la kutimon disvolvi legadon en Esperanto. Estas nenio pli efika ol legado por prezenti min al novaj vortoj kaj lerni pli.

Per ĉio ĉi mi povis konstati, ke Esperanto estas pli ol nur lingvo. Ĝi havas historion, havas movadon, ne volas preni ies spacon. Min tre ĝenas, ke homoj diras, ke Esperanto estas malaktuala. Nur tiuj, kiuj havas la ŝan-

con kaj permesas al si studi ĝin, povas kompreni ĝian belecon kaj aplikon.

Mi rimarkas, ke tio ne estas io uto-
pia, sed prefere io konkreta, kiu vere
povas fari diferencon en la monda
historio.

Malgraŭ la longaj ĉiutagaj agadoj,
mia celo ĉi-jare estas partopreni en la
San-Paŭla Esperanto-Asocio. Subteni

la institucion estas esence por la funk-
ciado de la lingvo. Tiel ni povas amik-
iĝi, konservi nian kritikan pensadon
kaj, plej grave, labori kaj fari nian
kontribuon al tre bezonata lingvo.

Luiz Gustavo Mota

(26-jara, el la urbo San-Paŭlo, instruisto
pri Portugalaj Lingvo kaj Historio)



Plia eldonaĵo de EASP



Kinkas Borba

Machado de Assis

Tradukis

Francisco S. Wechsler

Rabatita je 25% dum la tuta marto!

<https://easp.org.br/butiko>

Brazila Kongreso de Esperanto 2025 en la ĉefurbo Braziljo

Ne estas ideologio supera al solidareco.

Antaŭaj konsideroj

La Art. 4^a, alineo III, de la Statuto de BEL – Brazila Esperanto-Ligo – asertas, ke unu el la konstantaj celoj de Brazila Esperanto-Ligo en nia lando estas *“promover e coordenar a realização periódica do Congresso Brasileiro de Esperanto”*. Tiucele BEL-Prezidanto starigis la LKK-on – Lokan Konstantan Komisionon en la sideja urbo por la kunordigo de la laboroj. Nur esperantistoj, kiuj antaŭe partoprenis tiun taskon havas ideon pri la laborego dum tiaj iniciatoj. Memoru pri tio, karaj LKK-anoj de urboj, kiaj Fortalezo, Salvadoro kaj antaŭaj sidejo-urboj.

Tuj post la lasta BKE en Salvadoro-BA, BEL-Estrarar ekkontaktis eblajn respondeculojn pri la BKE 2025, okazonta en la Federacia Distrikto (DF). Pasintjare mem, flanke de BEL, okazis ĉeestaj konversacioj kun la Prezidantoj

de EAB, Esperanta Asocio de Braziljo, de UP, Unio Planeda (União Planetária-TV Supren) kaj aliaj virtualaj kunlaborantoj. Nu! Institucioj dependas de la entuziasmo de sia Estraro kaj membroj. Tio ne mankas al la menciitaj estraranoj de Unio Planeda, ekzemple, kiuj sin proponis kune labori por la okazigo de BKE, sub la kunordigo de BEL kaj EAB.

Krom tio, menciindas la konstantaj celoj de BEL:

“promover a integração do Brasil no movimento esperantista internacional” (alinea V); VI – promover e incentivar o intercâmbio da cultura brasileira com a de outros povos; VII – manter biblioteca com acervo editado no Brasil e no mundo em e sobre o Esperanto e assuntos congêneres; VIII – fomentar o aprendizado e uso do Esperanto entre jovens e crianças, em nível nacional; IX

– *promover o aprendizado e uso de Esperanto entre instituições não-esperantistas, sejam elas Sociedades, Associações ou Fundações.*

Tial nia unua kunsido konsideris tiujn gravajn statusajn aspektojn. Surbaze de la malneto de la tagordo de nia unua laborkunsido, la ĉefajn ideojn tie starigitajn ĉi tiu artikolo prezentos.

Unuaj kunsidoj de la volontula nukleo de LKK

Jen skizo de la Memoro de la unua Laborkunsido okazinta la 22an de Februaro 2025 en Utopia Café Bistrô (Memorialo Darcy Ribeiro/UnB) de la 13^a horo kaj duono ĝis la 15^a kaj duono. La tagordo vortas tiel:

- 1) Ĉefa: Congresso Brasileiro de Esperanto – 2025
- 2) Dua: outros temas sobre o Esperanto

Ĉeestantoj: Maria Angela da Silva; Paulo P Nascentes; Ulisses Riedel e Vanda Beatriz Riedel. Pravigaj malĉeestoj: Sr. Enivaldo A. Silva, Prezidanto de EAB; S-rino Ursula Grattapaglia (BEUP, Bona Espero). Inter la alparolataj temoj, citindas:

I. Ampleksigo de la apogo al la realigo de BKE 2025, sub la gvido de S-ro Prezidanto de EAB;

II. Repreno de Esperantaj Konversacioj en la Sidejo de Unio Planeda (Utopio Café Bistrô/UnB);

III. Vizitoj al Ambassadejoj de Landoj de BRICS por konsciigo pri la jenaj temoj: Lingvaj Baroj en Internacia Komunikado; Parolataj Ligoj en BRIKSaj Landoj; Situacio de Esperanto en ĉiu Lando; Risko de Malapero de Gepatraj Lingvoj pro la Lingva Imperiismo;

IV. Rezolucioj de UNESKO favore al Esperanto;

V. Ĉu ja ekzistas lingvaj baroj en la Mondo? Kiamaniere homoj kaj institucioj tion perceptas?

VI. Revuoj en Eo: *Esperanta Kuriero*, *Le Monde Diplomatique*; *Esperanto* (UEA), *Brazila Esperantisto*;

VII. Ebla ligo al la 17 ODS – Daŭrigeblaj Celoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Inter la iniciatoj menciindas: agendi surbendigon de televida programo



kun Landaj Ambasadoroj pri la temo “Kulturo, Tutmondigo kaj Lingvaj Baroj”; starigo de internaciaj simpozioj, seminarioj, forumoj kun la Estraro de tiuj landoj (Unio Planeda-TV Supren); Surbendigo de aŭdvida material libere disdonota dum la BKE.

Provizora Kongresa Temo

Provizore elektita temo: GEPATRAJ LINGVOJ KAJ ESPERANTO EN BRICS. Pri tiu temo duope sindisponis prelegi Prof-ro Paulo P Nascentes kaj D-ro Ulisses Riedel. Sub la kunordigo de S-ro Enivaldo, la LKK difinos la rolon de ĉiu partnero kaj la fina versio de la kongresa temo.

Kiel ebla kongresejo oni unue pensis pri la Memorialo Darcy Ribeiro/ UnB, tamen la grupo prudente serĉos aliajn eblojn, kiel Fundação Osvaldo Cruz aŭ la Aŭditorion de la Rektorejo de UnB plus studĉambroj. Pro la komplekseco de la temo, ni kunsidos eble virtuale la venontan jaŭdon, la 27an de Februaro, por decidi pri la ceteraj farenaĵoj, ekzemple kiujn aŭtoritatajn inviti; celpubliko; starigo de kontraktoj kun transportaj entreprenoj, akordoj kun hoteloj, restoracioj,

k.t.p. Alia decidota temo estas pri la Kongresa Komunikado: preparo de bulteno, disvastiga materialo; televidaj intervjuoj; publikigo de materialo pri prelegoj, debatoj, paneloj, artaj prezentadoj. Certe aliaj temoj gravas, kia la formado de instruistoj por ĉiu instrunivelo; starigo de Esperanto en lernejoj; kontakto kun la estraro de UnB Idiomoj.

Indas mencii la kunlaboremon de konataj esperantistoj kaj institucioj, nome Grupo Nova Erao (Brazlando), Bieno Bona Espero, Emílio Cid (Santos, SP). Al tiu unua nukleo certe aliaj esperantistoj kaj institucioj aldoniĝos.

La venonta plankunsido okazos samloke aŭ bitĉambre la 27an de februaro 2025. Entuziasmo estas nia devizo! Se tamen ĉi tiu modesta raporto iel tuŝas vian koron, vi el DF, vi el iuj ajn Federacia Unuo, vi eksterlandano aŭ brazilano vivanta alilande, vi povos, laŭpete, partopreni niajn kreatajn fakajn komisionojn. Venu! Kial ne vi, samideano?

Paulo P. Nascentes

Emerita docento (IL/UnB) kaj
psihoterapiisto



Ĉu vi emas studi Esperanton en franca kastelo?

La franca esperantista kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj en 2025:

2025-apr-18/27: PRINTEMPAS, **intensivaj kursoj** por ekzamenoj kun 4 famaj instruistoj: gresillon.org/p

2025-jun-30/jul-10: **Maratona Esperanto-kurso** kun 3 instruistoj, ankaŭ por blinduloj, kun Internacia E-Konferenco: gresillon.org/m

2025-aŭg-24/29: **Verda Naturisma Semajno** kun E-kursoj: gresillon.org/n

2025-okt-24/nov-02: AŬTUNAS, **kursoj kaj FEI-ekzameno** kun Renée Triolle: <https://gresillon.org/au>

Agendo de la sekvaj agendoj: gresillon.org/a

Kontakto: kastelo@gresillon.org

